K. Sanfield, University of Copenhagen; Mgr. Schrijnen, University of Nijmegen; A. Sèchehaye, University of Geneva; A. Sommerfelt, University of Oslo; Prince N. Trubetzkoy, University of Vienna; C.C. Uhlenbeck, University of Leyden; J. Vendryès, University of Paris; J. Wackernagel, Universtiy of Basle; N. van Wijk, University of Leiden." Dum la fina sesio parolis la ĝenerala sekretario de la kongreso, Albert Sèchehaye, pri rehabilito de artefaritaj lingvoj, al kiuj la sciencistoj povas multon kontribui. La menciitan atestilon krome subskribis pluaj aliaj lingvistoj dum la sekva, Tria Internacia Kongreso de Lingvistoj en Romo en la jaro 1933 (komp. ekz. Barandovská-Frank 2011).

Interlingvistiko do tiam estis akceptata en sciencaj rondoj kiel parto de lingvistiko, esploranta kaj konstruanta helplingvojn. IALA, en sia kvalito de profesia lingvista organizaĵo, multe kontribuis al ĝia prestiĝo. Fine de la tridekaj jaroj ĝi forlasis sian planon pri elekto aŭ sintezo de ekzistantaj internaciaj helplingvoj kaj plene dediĉis sin al ellaboro de tute nova interlingvo surbaze de eŭropeca internacia vortaro. Ankaŭ la derivaĵ-afiksoj kaj bazaj gramatikaj reguloj korespondis al ĝeneralaĵoj en okcidenteŭropaj lingvoj. Oni ellaboris kvar variantojn de la estonta lingvo, kies specimenoj estis kune kun detalaj demandiloj senditaj al trimilo da personoj en Eŭropo kaj Ameriko. Surbaze de ricevitaj komentoj konstruis la tiama IALA-direktoro Alexander Gode la rezultan formon nomatan "Interlingua"[8], kiu publikiĝis en 1951. Du jarojn poste estis IALA malfondita.

Oni povintus kredi, ke interlingvistiko tiam estis atinginta sian celon, ĉar la science ellaborita interlingvo ĵus ekzistis. Bedaŭrinde mankis – kaj mankas – la dua gravega komponanto, nome la enkonduko de ĝi en praktikon. Interlingua de IALA parte akceptiĝis ĉe eŭropaj sciencistoj, ĉefe kiel lingvo de resumoj de sciencaj verkoj, estante senlerne komprenebla al tiuj, kiuj scipovis ĉefajn okcidenteŭropajn lingvojn, sed ĝia publika akcepto estis neniom pli granda ol tiu de aliaj interlingvoj. Interlingvistiko do ekserĉis novajn vojojn, kiuj kondukis i.a. al inkludigo de lingvopolitika kaj sociologia komponantoj.

3. Post IALA

Hermann Ölberg, indoĝermanisto-etimologo en la Universitato Innsbruck, publikigis en 1954 sian unuan interlingvistikan verkon „Zur Grundlegung der Interlinguistik" („Pri bazigo de interlingvistiko")[9], en kiu li komence konfirmis, en la senco de Jespersen, komprenon de termino „interlingvoj" kiel lingvoj, uzataj ne nur en interna, sed ankaŭ en interŝtata komunikado inter parolantoj kun diversa lingva aparteneco – kiel ĉiuj lingvoj denature, interlingvoj estu rimedo de homa kuniĝo/kontakto, ne de homa diversigo. Poste menciiĝis internacia influo de la Araba en islamaj landoj, de la Franca en eŭropaj rilatoj kaj de la Angla tutmonde, sen eksplicite agnoski religiajn, politikajn kaj ekonomiajn kialojn kiel ĝustan kaŭzon de tiu ĉi povo. Ölberg konkludis, ke la

[8] Interlingua estas nun promociata de „Union Mundial pro Interlingua", fondita 1955, vidu www.interlingua.com
[9] Bibliografion de liaj interlingvistikaj verkoj vidu en "Informilo por Interlingvistoj", 12-a jaro (tria serio) n-ro 42 (3/2002), ISSN 1385-2191

estonteco pli kaj pli bezonos interlingvon kaj ke ties evoluo kaj stabiligo ne okazu senkontrole, sed helpe de interlingvistika esploro kaj kunlaboro. Li dediĉis multe da spaco al pripensoj pri supozata aspekto de la internacia helplingvo, kun kies projektoj havis interlingvistiko jam sesdekjarajn spertojn. Ĉar Esperanto estis la plej disvastiĝinta inter ili, konsideris Ölberg *esperantologion* integra parto de interlingvistiko. La terminon "esperantologio" estis enkondukinta en la jaro 1921 aŭstra terminologo Eugen Wüster, samkiel, en 1931, la terminon "planlingvo" (en la germana formo « Plansprache »), kiu praktike estas sinonimo por "interlingvo" kaj estadas kiel tia uzata ĉefe en literaturo german- kaj Eperant-lingva (vidu Wüster 1949).

Inkludigo de esperantologio en interlingvistikon estis direktiĝo al ties pliriĉigo, sed la sciencon mem oni ankoraŭ komprenis kiel branĉon de lingvistiko (ĉar ĝi uzas lingvistikajn metodojn), okupiĝantan ekskluzive pri konstruado de interlingvoj = planlingvoj, eventuale pri ties historio. La unuan paŝon al plilarĝigo de la difino atestas artikolo (1959) de germana esperantisto Artur Bormann, kiu skribis (trad.): "*...interlingvistiko estas difinenda kiel tiu branĉo de scienco, kiu esploras ĝenerale politikajn, kulturajn, sociologiajn kaj lingvistikajn demandojn pri komuna internacia lingvo, samkvante uzenda de ĉiuj homoj en internaciaj rilatoj.*" (Bormann 1976^2, p. 294). Kvankam neniu internacia lingvo estis ankoraŭ oficiale akceptita, do el la jura vidpunkto ne ekzistas, ĝiaj problemaj tamen rajtas esti science esplorataj, emfazas Bormann la antaŭan eldiron de pluraj interlingvistoj. Li proponas sistemigi interlingvistikon ene de tri kampoj: *Ĝenerala interlingvistiko* okupiĝu pri rilatoj inter interlingvo kaj homo, elirante el ideaj kaj materiaj bezonoj de la homa socio kaj nacioj en la mondo; ĝi pristudu tiujn rilatojn inter lingvo, individuo kaj socio, kiuj estas relevantaj por ilia interkompreno. El tio ĝi deduktu principojn por elekto de taŭga interlingvo kaj observu la efikojn, kiujn tiu lingvo havos en politika, kultura, socia kaj ekonomia aspektoj. *Speciala interlingvistiko* esploru rilatojn inter la interlingvo kaj la etnaj lingvoj kaj observu ilian reciprokan influon. Tio estus aparta formo de kompara lingvistiko[10]. *Praktika interlingvistiko* enhavu sciojn pri la interlingvo mem, do pri ties vortaro, gramatiko kaj stilistiko, kaj sekvu ties evoluon. Bormann do unuflanke restas sur la linio de ĝistiama koncepto de interlingvistiko kiel scienco pri interlingvoj (komprenataj kiel artefaritaj lingvoj/planlingvoj, do ne etnaj lingvoj), krome rekomendas alpreni politikan, kulturan, socian kaj ekonomian aspektojn en la senco de "limitrofio" de Szilágyi, inkluzive de speciala rilato al etnaj lingvoj, kaj, fine, per enkonduko de "praktika" subkampo li malfermas pordon al esperantologio – subkomprenate al -"logioj" de aliaj interlingvoj.

4. Lingvoplanado kaj lingvopolitiko

Plua paŝo al pliampleksigo de la interlingvistika tereno okazis en la sesdekaj jaroj. La jam uzata termino "planlingvoj", favore koincidis kun la lingvistika koncepto de lingvoplanado, kiu tamen estis – kaj oftege estas ĝis nun – limigita al la kampo de etnolingvoj kaj eĉ sinonimigata kun lingvopolitiko. Interlingvistoj tiurilate apogiĝas al

[10] Mario Wandruszka (1971): Interlinguistik. Umrisse einer neuen Sprachwissenschaft. München: Piper, komprenas interlingvistikon kiel lingvokomparadon kaj esploron de universalaĵoj

la libro *Introduction to a theory of language planning* („Enkonduko en la teorion de lingvoplanado“) de estona-sveda lingvisto Valter Tauli (1968). Tiu ĉi teorio permesas pritrakti kaj etnolingvojn, kaj planlingvojn per la samaj metodoj: ĉar lingvo estas instrumento[11], sekve ĝi rajtas esti ŝanĝata, korektata, reguligata kaj plibonigata, kaj laŭbezone eĉ nove kreata. En ĉiu etnolingvo aperas, post aŭ/kaj samtempe kun ties spontanea evoluo, konscia normigo kaj kodigo kondukanta al fiksigo de gramatiko kaj vortaro, alivorte al lingva normo. Tia normo troviĝas ankaŭ en planlingvoj, tie tamen tuj ĉe la komenco de ilia evolu(ig)o. Lingvonormigon efektivigu, pledas Tauli, fakuloj, do lingvistoj. Tiun ĉi parton de lingvoplanado, koncernantan ĉefe kreadon de respektenda ortografio (aŭ entute skribo), gramatiko kaj vortaro por certa lingvokomunumo, nomas Tauli *korpusoplanado*. La dua parto de ĝi estas *statusoplanado*, rilatanta al apliko de la funkcio de lingvo. Ĝi koncernas la oficialigon de statuso de lingvo kiel nacia, ŝtata – kaj konforme ankaŭ internacia. Ĝi subtenas decidojn pri elekto de instrulingvo(j) en lernejoj, de oficialaj lingvoj en ŝtataj administrado kaj politiko, de laborlingvoj de naciaj kaj internaciaj organizaĵoj k.s. Tiu ĉi parto de lingvoplanado rekte koncernas lingvopolitikon kaj ofte estas reduktata al ĝi. (Post Tauli aperis la tria memstara parto de lingvoplanado por subteni la disvastigon de la koncerna lingvo, nome *akira planado*, kiu inkluzivas organizadon de lernado de lingvoj etnaj kaj fremdaj, do certasence apartan eron de statusa planado, - vidu Cooper 1989 - kaj en 2011 parolas Tonkin eĉ pri *prestiĝoplanado*). Tauli difinis la interlingvistikon jene (1968, p. 167, trad.): *"Interlingvistiko povas esti difinata kiel scienco pri internacia lingvoplanado, aŭ pli precize, kiel tiu branĉo de la teorio de lingvoplandado, kiu esploras la principojn, metodojn kaj taktikojn de planado pri internacia lingvo. Per internacia lingvo estas komprenata universala lingvo uzenda kiel rimedo de komunikado inter individuoj apartenantaj al diversaj lingvokomunumoj."*

Internacia lingvo = interlingvo = planlingvo kiel objekto de lingvoplanado estas ĉi tie evidente komprenata en la senco de Jespersen, kiu estis emfazinta la malsamecon de la propraj (etno)lingvoj dum internacia komunikado. La lingvoplanado tamen egaligis la aliron al tiuj ĉi interlingvoj kun tiu koncernanta "naturajn" interlingvojn, do etnolingvojn en inter(nacia)komunika funkcio, inkluzive de piĝinoj kaj kreoloj (vidu ekz. Schubert 2011), kaj, kompreneble, de la kreskanta prestiĝo de la angla lingvo. Kiom ampleksa kaj promesplena disvastigo de interlingvistikaj horizontoj! Ĉar post Interlingua de IALA apenaŭ aperis novaj, lingvistike serioze prikonsiderindaj projektoj[12], la fokuso de interlingvistiko komencis turniĝi de lingvokonstruado al lingvopolitiko. Jam en la komenca epoko de interlingvistiko oni firme kredis, ke por la funkciado de interlingvo necesas ties akceptigo per iu oficiala, kompetenta internacia organizaĵo. Ekzemple, Louis Couturat estis kolektinta en la jaro 1907 subskribojn de 307 societoj kaj 1251 sciencistoj sub la deklaracion pri dezirindeco de interlingvo, por peti oficialan internacian organizaĵon *Association Internationale des Académies* (Internacia Asocio de Akademioj) ke ĝi faru decidon pri akcepto de konkreta internacia helplingvo. Nur ĉar tiu ĉi

[11] ankaŭ en la senco de Wüster

[12] eble escepte de „Glosa“ de Wendy Ashby kaj Ronald Clark (1979), laŭ „Interglossa“ (Lancelot Hogben, 1948)

rifuzis, ekagis la Komitato de lia "Delegitaro por alpreno de la internacia helpanta lingvo", kiu produktigis Idon – nek tiu tamen montriĝis la dezirata solvo. En la jaro 1920 oni esperis, ke la oficialan internacian lingvon elektos la *Ligo de Nacioj*, al kiu estis prezentitaj pluraj projektoj (kaj tiucele ekestis ankaŭ Occidental). En 1922 la Ligo akceptis oficialan raporton favore al Esperanto, la samon faris en la jaroj 1954 kaj 1985 la Ĝeneralaj Konferencoj de *UNESCO*, esperantistoj havas siajn reprezentantojn ankaŭ ĉe la *Unuiĝintaj Nacioj* kaj ĉe la *Eŭropa Unio*, resume, la agnosko ĉe iu potenca internacia organizaĵo estas celo de lingvopolitikaj streboj, aŭ, se ni volas, de la "taktikoj de lingvoplanado" laŭ la intencoj de Tauli. Tial ankaŭ konsiderinda kvanto de interlingvistika literaturo okupiĝas ĉiaflanke pri lingvopolitiko inkluzive de lingvaj homaj rajtoj, elirante el la plendoj pri regado de la angla lingvo en internaciaj kontaktoj (vidu ekz. Philipson 1992 kaj multaj aliaj).

5. Interlingva komunikado kaj lingvofunkciado

La termino "interlingvo", difinita kiel helpa lingvo kun akcentigo de malsamlingveco de la uzantoj, estus en multaj lingvoj enkondukenda neologismo, tial ĝi estas ofte sinonimigata kun "internacia lingvo". Bedaŭrinde, la termino "inter*nacia* lingvo" ne ŝajnas esti taŭga, ĉar ĝi, eĉ se eble subkonscie, implicas la vorton "nacio", kiu, en plejmulto da kazoj, estas difinata politike, geografie kaj rilate al la ŝtato. La problemo montriĝas en tio, ke la nacio povas esti plurlingva (ekzemple svisoj) kaj male pluraj nacioj povas esti samlingvaj (ekzemple en Suda Ameriko – sekve la Hispana estus de si mem "internacia" lingvo). Difini interlingvistikon pli precize rilate al interlingvoj kaj samtempe pli larĝe rilate al la parolantaro klopodis rusa lingvisto Sergej Nikolajeviĉ Kuznecov: en 1982 (p. 5) li skribis, ke *interlingvistiko estas branĉo de lingvistiko, okupiĝanta per problemaro de interlingva komunikado*. En ĝian kompetenckampon apartenas problemoj kiel multlingveco (kaŭzoj, evoluo, pritraktado), planiteco de naciaj lingvoj, reciprokaj lingvaj influoj kaj ekesto de internaciismoj (gramatikaj, leksikaj, semantikaj ...) kaj esploro de internaciaj lingvoj. Kuznecov (1987) ankaŭ pligrandigas la esplorkampojn: *ĝenerala* interlingvistiko observu mondan lingvan situacion kaj nivelojn de interlingva komunikado, interesiĝu pri multlingveco, ties problemoj kaj solvoj helpe de lingvoj naturaj kaj artefaritaj. Ĝi evoluigu ĝeneralan teorion de internaciaj naturaj lingvoj kaj ĝeneralan teorion de internaciaj artefaritaj lingvoj: la primaran de lingvoprojektado kaj la sekundaran le lingvofunkciado[13]. *Parteca* (speciala) interlingvistiko enhavu teoriojn de unuopaj planlingvoj. En 1989 li emfazis, ke interlingvistiko, kiel *branĉo de aplikata lingvistiko*, estas scienco pri interlingva komunikado kaj interlingvoj ĝenerale, kaj ke ĝi nepre enhavu ambaŭ komponantajn teoriojn: pri lingvoprojektado kaj pri *funkciado* de planlingvoj.

Detaligon pri funkciado de planlingvoj ofertis germana lingvisto-ĝermanisto Detlev Blanke (plej aktuale 2006). La kruda divido de planlingvoj el la vidpunkto de ilia funkciado, t. e. socia realiĝo, estas al (a) projektoj, kiujn iliaj aŭtoroj plej ofte publikigis kaj eventuale disvastigis, sed apenaŭ trovis uzantojn, (b) semiplanlingvoj, kiuj havas

[13] Laŭ tiu ĉi koncepto do ĝenerala interlingvistiko enhavu ankaŭ taskojn de speciala interlingvistiko menciata ĉe Bormann.

modestan kvanton da uzantoj, kaj (c) planlingvoj plene funkciantaj, kun lingvokomunumo komparebla kun tiu de etnolingvoj. Por plifajnigi la apartenecon al unuopaj kategorioj, Blanke evoluigis intertempe 27-ŝtupan skalon da plenumendaĵoj, kiuj estas trapasataj survoje de planlingva projekto al lingvo: (1) manuskripto, (2) publikigo, (3) instrumaterialo, (4) varbado, (5) apero de revuoj, (6) korespondado, (7) tradukitaj kaj originalaj tekstoj, (8), buŝa komunikado, (9) ekesto de organizaĵoj, (10) propra literaturo, (11) neoficialaj lingvokursoj, (12) malgranda lingvokomunumo, (13) pridiskuto de lingvaj aferoj, (14) faka komunikado, (15) kunvenoj, konferencoj, kongresoj, (16) struktura diferencigo de la lingvokomunumo, (17) ellaboro, stabiligo kaj kodigo de la normo, (18) grandaj internaciaj okazaĵoj, (19) tutmonda disvastiĝo, (20) objekto de interlingvistika esploro, (21) interdisciplina influo, (22) ekstera apliko pere de neplanlingvanoj, (23) oficiala instruado, (24) uzado en elektronikaj amaskomunikiloj, (25) socia diferencigo de la lingvokomunumo, (26) familia lingvouzo, (27) originala kuluro, (28) spontanea lingvoevoluo. La planlingvaj projektoj atingas apenaŭ la naŭan ŝtupon de la skalo, kio validas ekzemple por Glosa; la plej multaj supre menciitaj, inkluzive de Interlingua, apartenas al la kategorio de semplanlingvoj; la plej altan gradon plenumas praktike nur Esperanto.

Tiu ĉi divido, kiu, unuflanke, plene pravigis la ekziston de esperantologio kiel (eĉ memstara) disciplino de interlingvistiko, aliflanke iom skeptike montras, ke okupiĝi pri semiplanlingvoj aŭ projektoj preskaŭ ne valoras la penon – se unu interlingvo jam funkcias, tiam atingiĝis "starigo de normoj por interlingvoj" en la senco de Jespersen kaj la esplorcelo antaŭvidita de Bormann. Por havi pli da aero por spiri, interlingvistiko bezonis pli grandan terenon: en 1985 (p. 293) difinis ĝin Blanke jene (trad.): "*Interlingvistiko estas interdisciplina lingvistika fako, kiu esploras internacian lingvan komunikadon kun ĉiuj ĝiaj politikaj, ekonomikaj lingvistikaj, informaciteoriaj kaj aliaj aspektoj.*" Tiu ĉi ruza difino, kovranta kaj la konstruon, historion kaj funkciadon de interlingvoj, kaj la terenon de lingva komunikado (eventuale eĉ de lingvokomparado), ofertas diversflankan kaj diversampleksan alireblon. Tiun ĉi praktikas ekzemple la germana societo por interlingvistiko "Gesellschaft für Interlinguistik" fondita de Blanke antaŭ dudek jaroj (vidu speciale la ĉapitron "Das Interlinguistikverständnis der GIL" en nia revuo [Blanke 2011], kie menciiĝas pluraj famaj interlingvistoj kaj bazaj direktoj).

6. Ĉu stabiliĝo?

En la lastaj tridek jaroj publikiĝis aro da verkoj pri interlingvistiko kaj interlingvistikaj temoj, inkluzive de monografioj, bibliografioj, prelegkolektoj, festlibroj, universitataj tezoj ekde bakalaŭraj ĝis habilitiĝaj; interlingvistikaj kursoj estas ofertataj enkadre de universitat(ec)aj studprogramoj[14] kaj kiel postdiploma specialiĝo. Oni do povus supozi, ke interlingvistiko stabiliĝis kiel scienco, kvankam, male al la IALA-periodo, malmultaj profesiaj lingvistoj pretas okupiĝi pri ĝi, eĉ se ĝia koncepto evoluiĝis ekde eksplicita okupiĝo pri interlingvoj (nomata ankaŭ "planlingvistiko") kun akcento al Esperanto ĝis multflanka kaj interdisciplina agado. Post la pionira ago de Jespersen dum

[14] La unua estis ĉe la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, gvidita de Prof. Szerdahelyi István.

la ĝeneva kongreso de lingvistoj en 1931 sukcesis diskutigi la interlingvistikon nur André Martinet dum ilia sesa kongreso en 1948 en Parizo, Detlev Blanke dum "ronda tablo" enkadre de la dekkvara kongreso en 1987 en Berlino kaj (modeste enkadre de lingvopolitika sekcio) Helmar Frank dum la deksesa kongreso en 1997 en Parizo. Aliflanke, kiel atentigas german-sveda interlingvisto Hartmut Traunmüller sur la Esperanta vikipedia paĝo http://eo.wikipedia.org/wiki/Interlingvistiko, lingvistoj publikigis studojn kun gravaj interlingvistikaj implicoj, al kiuj apartenas verkoj pri piĝinoj kaj kreoloj, pri konversaciaj maksimoj, pri diversaj lingvaj universalaĵoj kaj pri lingvosociologio. Kiel interlingvistikajn novaĵojn li karakterizas interlingvojn por handikapuloj kiel blisa skribo kaj indiana gestolingvo, uzadon de kontrolitaj lingvoj fare de grandaj entreprenoj kaj – ankoraŭ ne kontentige ellboritan – aŭtomatan tradukadon. Kiel ligo al tiu ĉi retpaĝo aldoniĝas listo de 75 "interlingvistikistoj", difinitaj kiel homoj, kiuj science okupiĝas pri interlingvistiko.

Ni tamen ne forgesu unu gravan detalon. La plej multaj "interlingvistikistoj" serioze okupiĝas pri Esperanto, en kiu sekve ekzistas la plej granda kvanto de interlingvistika literaturo. La "ekstera mondo" evidente malpli konsciiĝas pri la interlingvistika problemaro. Tion atestas ekzemple *vikipedioj*, kiuj nuntempe evoluiĝis al ĝenerale akceptata inform-instanco, malgraŭ la duboj pri ties seriozeco kaj objektiveco. Inter cento da vikipedioj, dekses enhavas artikolon "interlingvistiko", ofte produktitan de esperantistoj. Oni malfacile povas diri, ke ili enhavas ankaŭ validan difinon, ĉar eĉ ne du el la dekses klarigoj/difinoj(?) estas komplete identaj, kvankam la koncernaj paĝoprotokoloj indikas, ke ili estas reciproke kontrolataj per komputilrobotoj. Dek el ili eksplicite mencias Esperanton en la difino de studobjekto, naŭ el ili klare diras, ke interlingvistiko estas parto de lingvistiko.

La plej ampleksan artikolon enhavas la menciita Esperanto-versio, komenciĝanta per jena difino: *Interlingvistiko estas scienco, kiu studas la komunikadon inter homoj kiuj ne povas kompreniĝi pere de siaj gepatraj lingvoj. Ĝi esploras kiel en tia komunikado rolas kaj funkcias etnaj kaj interetnaj lingvoj, tradukado kaj teknikaj iloj. Ĝi ankaŭ rilatas al lingvopolitiko.* Sekvas klasigo kaj historio de interlingvoj, deviaj difinoj, notoj kaj eksteraj ligiloj.

El la Esperanta versio eliras la *germana* (kreita de roboto, adaptita de "Kristjan") kaj la angla (de "Annael"), kiuj estas ambaŭ malpli ampleksaj kaj kun malsimilaj detaloj en la difinoj. La germana emfazas, ke interlingvistiko estas parta disciplino de lingvoscienco, ĝi ne mencias tradukadon kaj teknikajn ilojn, sed jes ja planlingvojn kaj konkrete Esperanton. La *angla* substrekas studadon de diversaj aspektoj de lingva komunikado kaj krom Esperanto eksplicite mencias piĝinojn. Krome ĝi uzas terminon "lingua franca" kiel komunaĵon por "etnaj kaj helpaj lingvoj". La terminon "lingua franca" uzas ankaŭ la *portugala* versio (de brazilano Ticiano Duarte) kaj la *sveda* (de pluraj robotoj), La brazila artikolo mencias la Latinan, Zamenhof-on kaj Esperanton, IALA-n kaj Interlingua, kun kelkaj historiaj detaloj. La sveda difino emfazas interdisciplinecon kun ligiloj al kontrasta lingvistiko, lingvosociologio, lingvoplanado kaj lingvopolitiko.

La dua plej granda vikipedia artikolo, kreita evidente tute memstare, estas la *ukraina* (de "Znastya"), kiu, en la senco de Meysmans, diras, ke interlingvistiko estas science

praktika (sic) disciplino, kaj mencias helplingvojn (sic) Esperanto, Ido, Volapük kaj Interlingua. Ĝi klarigas la ekeston de la termino ĉe Meysmans kaj Jespersen kaj kelkajn specialiĝojn, precipe pri lingvokontaktoj kaj lingvofunkciado, citante la Rusan Enciklopedion el 1998. Krome ĝi enhavas historian ekskurson pri lingvoprojektoj ekde antiko tra humanismo ĝis interslavaj projektoj. Aldoniĝas ĉapitro pri interlingvistoj Evgenij Bokarjov kaj Aleksandr Duliĉenko kun ampleksa literaturlisto.

La *rusa* versio, kreita de esperantistoj Grigorij Grin kaj "Amikeco", klarigas, ke interlingvistiko, kiel parto de lingvistiko, interesiĝas pri diversaj aspektoj de internacia komunikado kaj ties optimumigo, kaj pri internaciaj artefaritaj lingvoj (ligilo al koncerna artikolo) inkluzive de Esperanto (ankaŭ ligilo). Sekvas ligilo al la retpaĝo de Interlingvistikaj Studoj de Mickiewicz Universitato en Poznań, al la germana GIL kaj al enciklopedia artikolo de Sergej Kuznecov. Ankaŭ la *pola* versio (de "Cyon", "Johannes" kaj esperantisto "Fringo") kompreneble enhavas ligilon al Poznań, sed ankaŭ al aliaj universitatoj kun kursoj pri interlingvistiko kaj Esperanto. Tre interesa estas la pola difino: *Interlingvistiko estas scienco okupiĝanta pri artefaritaj lingvoj kaj pri literaturo kreita en ili*. Ĝi estas la ununura, kiu entenigas ankaŭ literaturon (efektive, dum la interlingvistikaj studoj oni teoriumis pri "interfilologio", kiel scienco pristudanta kaj interlingvojn, kaj ties literaturon). Ankaŭ la *nederlanda* vikipedia artikolo (de esperantisto "Biciklanto") kompreneble enhavas la ligilon al la Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdam. La unua frazo de la difino samas kun la Esperanta de Traunmüller, inkludante do ankaŭ tradukadon kaj teknikaĵojn, sed la dua frazo sonas: *Interlingvistiko dividiĝas al kelkaj esplorkampoj: internacia lingvopolitiko, tradukscienco, internaciaj artefaritaj lingvoj, Esperanto (>esperantologio).* Tiun ĉi difinon transprenis ankaŭ esperantisto Marek Blahuš por la *ĉeĥa* versio, sed li uzas la terminon "planlingvoj", kiun la nederlandano evitas. La koncepton de Meysmanns enhavas ankaŭ la versio en *Interlingua* (de Julian Mendez), aldone iom pri historio de interlingvoj kaj pri interreta lingvokreado. Ĝi ŝajne nenion transprenis el aliaj versioj.

Nura stumpo estas la *itala* artikolo de esperantisto Fabio: Interlingvistiko estas branĉo de lingvistiko (ligilo), kiu okupiĝas pri studado de diversaj formoj de internacia komunikado, speciale per problemoj de lingvoplanado (ligilo) kaj internaciaj helplingvoj (ligilo) kiel Esperanto (ligilo). Simila estas la difino *franca* (de "Curry" kaj esperantisto Arno Lagrange), kiu ne enhavas ligilon al lingvoplanado, sed al Ido kaj Interlingua.

La *kataluna* versio (de "Barcelona") kiel ununura indikas apartenecon de interlingvistiko al kompara lingvistiko kun koncerna ligilo. Ĝi diferencigas helplingvojn de spontaneaj internaciaj lingvoj kiel piĝinoj (nomata estas russenorsk), kaj dividas (help)lingvojn laŭ maniero de disvastigo al buŝaj, buŝaj+skribaj, skribaj, signaj kaj muzikaj.

Gajárszki László, aŭtoro de la *hungara* artikolo, transprenas kiel difinon kompletan citaĵon de Jespersen el 1930 kaj aldonas informon kun ligilo al IALA.

La *gaela* versio (de Aibreán) baziĝas sur la klarigo de Detlev Blanke, trovebla interalie en lia kolekto « Interlinguistische Beiträge » (2006, p. 21).

Resume, ĉiu el tiuj ĉi difinoj enhavas iom da vero, sed ili vidigas, ke post cent jaroj da ekzisto de interlingvistiko oni ne povas aserti, ke ĝi estas klare difinita kaj ĝenerale akceptata scienco. Sur tiu ĉi kampo do ofertiĝas ankoraŭ sufiĉe da laboro kaj da novaj defioj. Tutcerte bonvenus pli da literaturo kaj fakrevuoj en etnaj lingvoj[15], samkiel pli da atentemo de lingvistoj neesperantistaj.

Literaturo:

Barandovská-Frank, Věra (1996): "Versus Interlinguistica"/aus der Geschichte der Interlinguistik. En: *grkg/Humankybernetik* Band 37, Heft 2, Juni 1996, p. 71-82.

Barandovská-Frank, Věra (2003): *De latino sine flexione centenario/Ein Jahrhundert Latino sine flexione*. Paderborn: Akademia Libroservo.

Barandovská-Frank, Věra (2011): *Dialogo kaj interkompreno en interlingvistika laboro de Otto Jespersen*. http://w3.forst.wzw.tum.de/~quednau/VBF/Jespersen.pdf

Blanke, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie Verlag.

Blanke, Detlev (2006): *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Herausgegeben von Sabine Fiedler. Frankfurt am Main etc.: Peter Lang.

Blanke, Detlev (2011): Die Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL). Grundanliegen und Praxis. En: *grkg/Humankybernetik*, Band 52, Heft 2, Juni 2011, p. 58-66.

Bormann, Artur (1976²): Grundzüge der Interlinguistik. En: *Sprachforum* 3 (1959/60), p. 14-25. (Represita en Haupenthal 1976, p. 278-296).

Cooper, Robert L. (1989): *Language planning and social change*. Cambridge: University Press.

Couturat, Louis et Léopold Leau (1903): *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette. (Reproduktita kune kun « Les nouvelles langues internationales » ĉe Georg Olms Verlag, Hildesheim-Zürich-New York 2001)

Couturat, Louis et Léopold Leau (1907): *Les nouvelles langues internationales*. Coulommiers: Imprimerie Paul Brodard. (Reproduktita kune kun « Histoire de la langue universelle » ĉe Georg Olms Verlag, Hildesheim-Zürich-New York 2001)

Haupenthal, Reinhard (eld.) (1976): *Plansprachen. Beiträge zu Interlinguistik*. Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft.

IALA (1931): *Linguistic research, sponsored by International Auxiliary Language Association in the United States, incorporated*. Statement prepared for the Second International Congress of Linguists, Geneva, 25-29 August, 1931. New York: IALA, National Headquarters.

Jespersen, Otto (1930/31): A New Science: Interlinguistics. Report of Meeting of Linguistic Research, Geneva 1930. En: *Psyche* 1930/1931, n-ro 3, p. 57-67. (Germana traduko en: Haupenthal 1976, p. 148-162)

Jespersen, Otto (1933): Que pensez-vous de l`adoption d`une langue artificielle come langue auxiliaire? En: *Actes du Deuxième Congrès International des Linguistes*, Genève 25.-29. août 1931. Paris 1933, p. 72-108

Kuznecov, Sergej Nikolajeviĉ (1982): *Osnovy interlingvistiki*. Moskva: Universitet druĵby narodov.

Kuznecov, Sergej Nikolajeviĉ (1987): *Teoretiĉeskie osnovy interlingvistiki*. Moskva: Izdatel'stvo Universiteta druĵby narodov.

Kuznecov, Sergej Nikolajeviĉ (1989): *Interlinguistics: a branch of applied linguistics*? En: Schubert 1989, p. 89-98.

Meysmans, Jules (1911): Une science nouvelle. En: *Lingua internationale*, Bruxelles, 1. 1911/12: 8, p. 14-16. (Germana traduko en: Haupenthal 1976, p. 111-112.)

[15] kiel "Language Problems and Language Planning" de John Benjamins Publishing Company, ISSN 0272-2690

Ölberg, Hermann Maria (1954): Zur Grundlegung der Interlinguistik. En: *Innsbrucker Beiträge zur Kulturwissenschaft,* 2. Band, Ammann-Festgabe, II. Teil. Innsbruck: Sprachwissenschaftliches Seminar der Universität Innsbruck, p. 64-70. (Represita en Haupenthal 1976, p. 243-254)

Perrenoud, William (eld.) (1930/2002): *IALA. Conférence de Recherches Linguistiques. Meeting of Linguistic Research. Procès-verbaux.* Genève, 20 Mars – 2 avril 1930. Represaĵo. Editoris kun antaŭparolo, indekso, notoj kaj bibliografio Reinhard Haupenthal. Schliengen: Edition Iltis, 2002

Phillipson, Robert (1992): *Linguistic imperialism.* Oxford: Oxford University Press

Schubert, Klaus (eld.)(1989): *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages. Trends in Linguistics.* Studies and Monographs 42. Berlin & New York: Mouton de Guyter.

Schubert, Klaus (2011): Zum bewussten Eingreifen in die Sprache. En: Brosch, Cyril k. Sabine Fiedler (eld.): *Florilegium interlinguisticum.* Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag. Frankfurt am Main etc.: Peter Lang. p. 47-60.

Szilágyi, Dénes (1931): Versus Interlinguistica. En: *Schola et Vita,* Milano 1931, p. 97-120. (Represita en Haupenthal 1976, p. 163-187, tradukoj en Barandovská-Frank 1996 kaj 2003)

Tauli, Valter (1968): *Introduction to a theory of language planning.* Uppsala: Almqvist & Wiksells.

Tonkin, Humphrey (2011): Plansprachen als Modelle der Sprachplanung. En: Brosch, Cyril k. Sabine Fiedler (eld.) : *Florilegium interlinguisticum.* Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag. Frankfurt am Main etc.: Peter Lang. p. 61-68.

Wüster, Eugen (1949): La terminoj „esperantologio" kaj „interlingvistiko". En: *Esperantologio* 1, 1949/55, p. 209-214. (Germana traduko en: Haupenthal 1976, p. 271-277)

Interretaj paĝoj je 2011-06-29

http://ca.wikipedia.org/wiki/Interlingüística
http://cs.wikipedia.org/wiki/Interlingvistika
http://de.wikipedia.org/wiki/Interlinguistik
http://en.wikipedia.org/wiki/Interlinguistics
http://eo.wikipedia.org/wiki/Interlingvistiko
http://fr.wikipedia.org/wiki/Interlinguistique
http://ga.wikipedia.org/wiki/Idirtheangeolaíocht
http://hu.wikipedia.org/wiki/Interlingvisztika
http://ia.wikipedia.org/wiki/Interlinguistica
http://it.wikipedia.org/wiki/Interlinguistica
http://nl.wikipedia.org/wiki/Interlinguïstiek
http://pl.wikipedia.org/wiki/Interlingwistyka
http://pt.wikipedia.org/wiki/Interlinguística
http://ru.wikipedia.org/wiki/нтерлингви́стика
http://sv.wikipedia.org/wiki/Interlingvistik
http://uk.wikipedia.org/wiki/Інтерлінгві́стика

Ricevita 2011-06-29

Adreso de la aŭtoro: Dr. Věra Barandovská-Frank, Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn, vera.barandovska@uni-paderborn.de

Interlinguistik 100 Jahre alt (Knapptext)

Der Termin „Interlinguistik" erschien zum ersten Mal 1911 als Bezeichnung für neue Wissenschaft, die sich mit Gestaltung der Hilfssprachen beschäftigen sollte. In diesem Sinne wurde sie auch 1931 von Otto Jespersen definiert. Die Definition wurde dann im Laufe den Jahrzehnten immer breiter gefasst, mit Beziehungen zur Sprachplanung, Sprachpolitik, Komparatistik und zu Nebendisziplinen wie Soziologie und automatische Übersetzung. Eindeutige und allgemeingültige Definition gibt es offensichtlich noch nicht.

Novaj publikaĵoj

Cyril Brosch & Sabine Fiedler (eld.): *Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag.* Frankfurft am Main etc.: Peter Lang, 424 p., ISBN 978-3-631-61328-3. Germanlingva. Firma bindaĵo.

Estas boveninde, ke, post festlibro Esperantlingva por Detlev Blanke okaze de lia 65-jariĝo, aperas ĉifoje germanlingva kolekto de 22 artikoloj kun interlingvistikaj temoj. Ĝi estas tre zorgeme redaktita de profesorino Sabine Fiedler, fakulino mem habilitiĝinta pri interlingvistika temo, kunlabore kun doktoriĝanto pri lingvistiko Cyril Brosch, finstudinto de interlingvistiko en Poznano.

Por informiĝi pri la enhavo sufiĉas legi la enkondukon verkitan de la eldonistoj (p. 9-18), en kiu ili resumas la ĝisnunan kontribuon de la jubileulo al interlingvistiko kaj koncize prezentas la enhavon de unuopaj artikoloj. Aldone (p. 19-28) troviĝas la plej aktuala bibliografio de publikaĵoj de Detlev Blanke el la jaroj 2006-2010. Priaŭtoraj informoj troviĝas je la fino (p. 421-424).

La unuopaj artikoloj estas aranĝitaj proksimume laŭteme ekde pli ĝeneralaj pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko, tra laboraĵoj pri planlingvoj, etnolingvoj kaj ties komparo, poste pri diversaj formoj de lingvokreado, ĝis leksikografiaj, didaktikaj, stilistikaj k.s. laboraĵoj pri Esperanto.

La unua artikolo de *Christoph Kimura Goro* okupiĝas pri diversaj ebloj de lingva komunikado inter malsamlingvanoj. *Klaus Schubert,* elirante el la difino de interlingvistiko, skribas pri diversa konscia lingvoinfluado. Pri lingvoplanado rilate al Esperanto skribas ankaŭ *Humphrey Tonkin. Sabine Fiedler* esploras, kiomgrade estas la temoj "planlingvoj" kaj "Esperanto" pritraktataj en la aktuala lingvopolitika literaturo. Eŭropa lingvopolitiko kaj speciale kazo de la irlanda lingvo estas la temo de *Seán O'Riain.*

Konkretaj lingvistikaj detaloj de planlingvoj estas pritraktataj en la artikoloj de *Wim Jansen* (etimologio de Esperanto kaj nederlandaj influoj) kaj *Cyril Brosch* (kiel planlingvoj dividas la spacon).

Heidemarie Salevsky priskribas rilatojn inter lingvo, kulturo kaj tradukado. *Bengt-Arne Wickström* analizas la kapablon de lingvoj enkorpigi fremdajm elementojn, menciante lingvotipologiajn kaj sociolingvistikajn kialojn. *Wilfiried Stöting* pridiskutas multajn interlingvistikajn temojn, ekz. dulingvecon, lingvoarkeologion, Zamenhofajn reformojn de Esperanto kaj fikciajn lingvojn.

Slavaj planlingvoj, precipe la plej novaj, aperantaj en interreto, estas temoj de *Věra Barandovská-Frank* kaj *Cornelia Mannewitz.* Pri fikciaj lingvoj ĉefe en la franca literaturo interesiĝas *Johannes Klare.*

Eksplicite pri Esperanto kaj ties reformoj skribas *Otto Back*, specialan biologian terminologion en leksikono de Esperanto priskribas *Erich-Dieter Krause.*

Lernadon de Esperanto pritraktas artikoloj de *Rudolf-Josef Fischer* kaj de *Velimir Piškorec. Oksana Burkina* prezentas rezultojn de sia disertaĵo pri norma prononco de Esperanto. La kontribuaĵo de *Till Dahlenburg* analizas multajn stilistikajn kaj retorikajn figurojn kaj ties aplikon en tradukoj german- kaj Esperantlingvaj. *Toon Witkam* okupiĝas pri specialaj komputilaj programoj, per kies helpo eblas starigi ampleksajn korpusojn kaj trovi konkordancojn por Esperanto.

La artikolo de *Fritz Wollenberg* eliras el la aperinta biografio de Zamenhof far Andreas Künzli kaj pliprofundigas kelkajn detalojn. *Ulrich Becker* montras, ke eldonado estas grava aktiveco en la vivo de planlingva komunumo. En lia eldonejo Mondial cetere aperis ankaŭ la sekve prezentota bibliografio de Detlev Blanke.

Instigi la ĵus menciitajn aŭtorojn, ke ili verku germanlingve, estis saĝa ideo. La germanligva libro pri planlingvoj, verkita de la jubileulo en 1985, apartenas al la klasikaĵoj ĉikampe. Sed ĉar la plej granda planlingvo estas Esperanto, aperas en ĝi ankaŭ la plej granda kvanto de interlingvistika literaturo. Tiu fakto, kiel montriĝas ekzemple sur interretaj paĝoj, ofte negative influas nemovadajn fakulojn, kiuj okupiĝas pri lingvoplanado, lingvopolitiko kaj similaj temoj. Fakaj artikoloj, skribitaj en (la plej granda!) eŭropa etnolingvo kaj prezentataj en deca, bonkvalite aranĝita kaj presita libro, certe povas helpi altigi la prestiĝon de interlingvistiko ĝenerale.

Becker, Ulrich (eld./Hrsg.) (2011): *Interlingvistiko kaj Esperantologio. Bibliografio de la publikaĵoj de Detlev Blanke. Kun dulingvaj enkondukoj kaj indeksoj./ Interlinguistik und Esperantologie. Bibliographie der Veröffentlichungen von Detlev Blanke. Mit Einführungen und Registern in Deutsch und Esperanto.* New York: Mondial, 234 p., ISBN 978-1-59569-202-3

Okaze de la sepdekjariĝo de Detlev Blanke aperas ankaŭ lia publikaĵlisto (1958 – 2010) kun 1207 registritaj bibliografiaj unuoj. Temas pri modele profesie prilaborita broŝuro, eldonita de Ulrich Becker: li post studoj en Berlino magistriĝis pri eldonado en Novjorko, kie li gvidas eldonejon Mondial.

Ĉar la ĉefaj publikaĵlingvoj de la bibliografiito estas la Germana kaj Esperanto, aperas ankaŭ ĉiuj komentoj kaj klarigoj en tiuj du lingvoj. En la antaŭparolo de eldonisto (p. 1-4), kiu priskribas la publikaĵ-aktivecon de Detlev Blanke, menciiĝas ties ĉefaj interes-kampoj:

- interlingvistiko kaj esperantologio
- terminologia scienco
- lingvopolitiko
- Esperanto kaj instruado, instrumaterialoj
- Historio de la E-movado, ĉefe laborista
- E- movado en GDR
- E-movado en socialismaj landoj
- internacia E-movado
- interhomaj rilatoj

La bibliografion antaŭiras (ankaŭ dulingva) artikolo "Enkonduko en la bibliografion" (p. 4-26), skribita de la aŭtoro mem. Li pripensas, kion oni listigu en la registro, ĉu ĉion aŭ ĉu elekton (ĝis 2011 jam estis aperintaj tri elektoj, ĉi-foje "preskaŭ" ĉio), li klarigas, ke lian temaron difinis la ligo inter teorio kaj praktiko, kaj li indikas la celgrupojn de siaj publikaĵoj. Plue li priskribas kelkajn tipojn de personaj bibliografioj, prezentas la strukturon de la sia kaj nomas kelkajn bibliotekojn kaj arkivojn, kie estas troveblaj la koncernaj materialoj, ĉefe periodaĵoj. Geedzoj Blanke mem posedas tre ampleksan kolekton de scienca literaturo pri interlingvistiko kaj esperantologio. Post biografio de Detlev Blanke kaj post klarigo de uzotaj mallongigoj sekvas la bibliografio mem, en tri partoj.

A. La ĉapitroj 1-7 (p. 35-188) enhavas publikaĵojn ordigitajn laŭ tekstospecoj:

1. Monografioj
2. Redaktitaj antologioj
3. Redaktado kaj produktado de binditaj manuskriptoj
4. Tradukoj
5. Redakto de periodaĵoj
6. Diversaĵoj
7. Artikoloj, recenzoj kaj kontribuoj en antologioj

Detlev Blanke opiniis grava registri ankaŭ nepresitajn materialojn (parto 3), kiuj enhavas foje valoran historian materialon kaj liveras citeblajn tekstojn. La plej ampleksa estas la ĉapitro 7, kiu krude dividiĝas en du grupojn:

I. fakaj tekstoj pri interlingvistiko kaj esperantologio
II. organizaj kaj praktikaj primovadaj artikoloj.

Ene de la unuopaj ĉapitroj, la eroj estas listigitaj kronologie laŭ la jaro de publikigo. Al la bibliografiaj registraĵoj kelkfoje aldoniĝas rimarkoj de la aŭtoro pri la enhavo, se ĝi ne rekoneblas el la titolo mem. Sub la unuopaj titoloj, kiuj estis recenzitaj de aliaj aŭtoroj, aperas ankaŭ listo de tiuj recenzoj. Krome estas indikataj la eventualaj rilatoj al aliaj titoloj kaj al interretaj paĝoj.

Partoj B kaj C (ĉapitroj 8-15, p. 189-234) entenas helpmaterialon por pli bona orientiĝo ene de la libro:

8. Publikaĵoj pri D. Blanke en la Germana
9. Publikaĵoj pri D. Blanke en Esperanto
10. Listoj kaj indeksoj de periodaĵoj
11. Listoj kaj indeksoj de recenzitaĵoj
12. Nomindekso
13. Lingvoindekso de tradukaĵoj
14. Objektoindekso
15. Temindekso

La libro estas klare ordigita kaj nepre utila por interesitoj ĉefe germanlingvaj kaj Esperant-lingvaj, kiuj volas pliprofundigi siajn sciojn en la menciitaj kampoj. Tiucele estus verŝajne ankaŭ utile, krom la aktuala foto de D. Blanke, publikigi ankaŭ lian kontaktadreson, evtl. tiun de simpla aliro al lia arkiv-retpaĝo.

Věra Barandovská-Frank

Richtlinien für die Kompuskriptabfassung

Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 2001 auch Artikel in allen vier anderen Arbeitssprachen der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, also in Internacia Lingvo (ILo), Englisch, Französisch und Italienisch. Bevorzugt werden zweisprachige Beiträge – in ILo und einer der genannten Nationalsprachen - von maximal 14 Druckseiten (ca. 42.000 Anschlägen) Länge. Einsprachige Artikel erscheinen in Deutsch, ILo oder Englisch bis zu einem Umfang von 10 Druckseiten (ca. 30.000 Anschlägen) in 14-pt Schrift. In Ausnahmefällen können bei Bezahlung einer Mehrseitengebühr auch längere (einsprachige oder zweisprachige) Texte veröffentlicht werden.

Das verwendete Schrifttum ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluss des Beitrags zusammenzustellen – verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b", usf. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und Erscheinungsjahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenartikel werden - nach dem Titel - vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. – Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem, Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – **Bevorzugt werden Beiträge, die auf früher in dieser Zeitschrift erschienene Beiträge anderer Autoren Bezug nehmen.**

Graphiken (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) und auch Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu nummerieren und nur so im Text zu erwähnen. Formeln sind zu nummerieren.

Den Schluss des Beitrags bilden die Anschrift des Verfassers und ein Knapptext (500 – 1.500 Anschläge einschließlich Titelübersetzung). Dieser ist in mindestens einer der Sprachen Deutsch, Englisch und ILo, die nicht für den Haupttext verwendet wurde, abzufassen.

Die Beiträge werden in unmittelbar rezensierbarer Form erbeten. Artikel, die erst nach erheblicher formaler, sprachlicher oder inhaltlicher Überarbeitung veröffentlichungsreif wären, werden in der Regel ohne Auflistung aller Mängel zurückgewiesen.

Direktivoj por la pretigo de kompuskriptoj

Krom germanlingvaj tekstoj aperas ekde 2001 ankaŭ artikoloj en ĉiuj kvar aliaj laborlingvoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, do en Internacia Lingvo (ILo), la Angla, la Franca kaj la Itala. Estas preferataj dulingvaj kontribuaĵoj – en ILo kaj en unu el la menciitaj naciaj lingvoj – maksimume 14 prespaĝojn (ĉ. 42.000 tajpsignojn) longaj. Unulingvaj artikoloj aperadas en la Germana, en ILo aŭ en la Angla en amplekso ĝis 10 prespaĝoj (ĉ. 30.000 tajpsignoj) en 14-pt skribgrandeco. En esceptaj kazoj eblas publikigi ankaŭ pli longajn tekstojn (unulingvajn aŭ dulingvajn) post pago de ekscespaĝa kotizo.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo; en kazo de samjareco aldonu „a", „b", ktp. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De monografioj estu – poste – indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj la jaro de la apero kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - **Preferataj estas kontribuaĵoj, kiuj referencas al kontribuaĵoj de aliaj aŭtoroj aperintaj pli frue en ĉi tiu revuo.**

Grafikaĵojn (kiuj estas havigendaj laŭeble kiel presoriginaloj) kaj ankaŭ tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii en la teksto nur tiel. Formuloj estas numerendaj.

La finon de la kontribuaĵo konstituas la adreso de la aŭtoro kaj resumo (500 – 1.500 tajpsignoj inkluzive tradukon de la titolo). Ĉi tiu estas vortigenda en minimume unu el la lingvoj Germana, Angla kaj ILo, kiu ne estas uzata por la ĉefteksto.

La kontribuaĵoj estas petataj en senpere recenzebla formo. Se artikolo estus publicinda maljam post ampleksa prilaborado formala, lingva aŭ enhava, ĝi estos normale rifuzata sen surlistigo de ĉiuj mankoj.

Regulations concerning the preparation of compuscripts

In addition to texts in German appear from 2001 onwards also articles in each four other working languages of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino, namely in Internacia Lingvo (ILo), English, French and Italian. Articles in two languages – in ILo and one of the mentioned national languages – with a length of not more than 14 printed pages (about 42.000 type-strokes) will be preferred. Monolingual articles appear in German, ILo or English with not more than 10 printed pages (about 30.000 type-strokes) in 14-pt types. Exceptionally also longer texts (in one or two languages) will be published, if a page charge has been paid.

Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors (abbreviated if necessary) should be indicated. Monographs should be named along with place and year of publication and publisher, if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – **Preferred will be texts, which refer to articles of other authors earlier published in this journal.**

Graphics (fit for printing) and also tables should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. and should be referred to as such in the text. Mathematical formulae should be numbered.

The end of the text should form the author's address and a resumee (500 – 1.500 type-strokes including translation of the title) in at least one of the languages German, ILo and English, which is not used for the main text.

The articles are requested in a form which can immediately be submitted for review. If an article would be ready for publication only after much revising work of form, language or content, it will be in normal case refused without listing of all deficiencies.